

Friedrich Schiller,

## Al la ĝojo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Ĝoj'! Fajrero belradia!  
Elizea di-filin'!  
fajrebrie ni al via  
templo iras, preĝi vin.  
Ĉesu, de vi sorĉligate  
de l' rigora mod' la ŝir',  
ĉiuj homoj sentas frate,  
se vi ŝirmas per flugil'.

Ĥoro:

Jen brakumoj al milmiloj,  
Jen ĉi kis' al tuta mond'!  
Fratoj! super stela rond'  
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis  
kaj amikon gajnis vi,  
se virina am' vin ravis:  
Vin enmiksu kun ĝojkri'!  
Jes, se eĉ nur unu koro  
estas via en la mond'!  
Kaj se ne – do vin kun ploro  
ŝtelu for el nia mond'.

...

Friedrich Schiller,

## Al la ĝojo

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĝojo! Vi fajrero dia,  
d'Elize' filino vi!  
En sanktej' benita via  
arde vin omaĝas ni.  
Sorĉe ligas vi beate,  
se disigis malraci'.  
Hom' al hom' estiĝas frate,  
kie milde regas vi.

.....

.....

.....

.....

.....

Kiu de amik' fidela  
nomas sin amik' de li,  
kiu kun edzin' anĝela  
vivas, jubiladu pli,  
eĉ, se nur al unu koro  
ie ligas lin inklin'.  
Sed aliaj ja kun ploro  
el la lig' forŝtelu sin.

...

Friedrich Schiller,

## Al la ĝojo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĝojo, bela sparko dia,  
de l' ĉielo vi filin',  
ĝoje staras ni en via  
templo kaj adoras vin.  
Sorĉe ĉio religiĝas,  
kio apartigis sin,  
ĉiuj homoj gefratiĝas,  
kie vi restigas vin.

Ĥoro:

Estu chirkaŭbrakumitaj,  
lasu kisi vin, homar' !  
Estu unu amikar'  
ĉiuj homoj disigitaj!<sup>2</sup>

Se vi faris grandan ĵeton  
kaj amikon gajnis vi,  
aŭ akiris virineton,  
kunjubilu vi kun ni !  
Ja – se vin nur amas iu  
en la bela, vasta mond'!  
Kiu restas sola, tiu  
plore iru el la rond'!

...

<sup>2</sup>Tiu verso ne tute redonas la enhavon de la koresponda origina strofo.

Ĥoro:	.....	Ĥoro:
Ĥiu sub ĉielo glata	.....	.....
donu sin al simpati',	.....	.....
al la steloj gvidas ĝi,	.....	.....
kie tronas Nekonata.	.....	.....
Ĥiu sur la brust' Natura	.....	.....
suĉas sukon de la ĝoj'	.....	.....
kor' malbona, koro pura	.....	.....
sekvas ŝin laŭ roza voj'.	.....	.....
Ŝi vinberojn, kisojn donas	.....	.....
kaj amikon sen pridub',	.....	.....
en volupt' la vermo dronas,	.....	.....
vidas Dion la kerub'.	.....	.....
Ĥoro:	.....	Ĥoro:
Ĥu genuas vi, milmiloj?	.....	.....
Vi kreinton sentas, mond' ?	.....	.....
Serĉu super stela rond',	.....	.....
loĝas Li trans astro-briloj!	.....	.....
En eterno de l' Naturo	Ĥojo estas la risorto	.....
Ĥojo estas la risort'.	en eterna la natur'.	.....
En la mondhorloĝ' por kuro	Ĥojo jen per sia forto	.....
radojn pelas ŝia fort'.	movas l'universon nur.	.....
Ŝi el ĝerموj logas berojn,	Florojn el burĝonoj logas,	.....
sunojn regas ŝia gvid'	sunojn, astrojn puŝas ĝi.	.....
Ŝi tra l' spaco rulas sferojn	Sferojn forajn ĝi apogas	.....
trans la astronoma vid'.	en senfina galaksi'.	.....
...	...	...

Ĥoro:	.....	Ĥoro:
Kiel sur la pompaj vojoj	.....	.....
sunoj sur la firmament',	.....	.....
gaje marŝu, frata gent',	.....	.....
kiel venki la herooj!	.....	.....
Esploriston ŝi alridas	.....	.....
el la fajrspegul' de l' Ver',	.....	.....
sur krutaj' de l' Virto gvidas	.....	.....
ŝi la homon de toler',	.....	.....
sur Kred-Monto sunobrila	.....	.....
flirtas ŝia flag' el or',	.....	.....
ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila	.....	.....
vidas ni en anĝel-ĥor'.	.....	.....
Ĥoro:	.....	Ĥoro:
Ho toleron, paciencon,	.....	.....
fratoj, por pli bona mond'!	.....	.....
Donos super stela rond'	.....	.....
granda Dio rekompencan!	.....	.....
Ĉu pripagi diojn? Vanto!	.....	.....
Ĉu simili? Bela pen'!	.....	.....
Venu ĝoji kun ĝojanto	.....	.....
la mizero, la ĉagren'.	.....	.....
Venĝ'? Koler'o? En forgeson!	.....	.....
Jen pardon' al malamik'!	.....	.....
Liaj larmoj havu ĉeson,	.....	.....
lin ne boru pento-pik'.	.....	.....
...	...	...

Ĥoro:	.....	Ĥoro:
En ŝuldlibroj plu nenio!	.....	.....
Mondon regu harmoni'!	.....	.....
Fratoj! Kiel juĝis vi,	.....	.....
tiel juĝos pri vi Dio!	.....	.....
Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj,	.....	.....
en orsango de l' vinber',	.....	.....
mildon trinkas kanibaloj,	.....	.....
heroecon malesper'.	.....	.....
Se rondiras la botelo,	.....	.....
fratoj, saltu el la sid',	.....	.....
ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo:	.....	.....
Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'!	.....	.....
Ĥoro:	.....	Ĥoro:
Himnas Lin abismo stela,	.....	.....
serafar' kun glora cit'.	.....	.....
Jen ĉi glas' por Bon-Spirit',	.....	.....
supre, trans la tend' ĉiela!	.....	.....
En suferoj: firma forto,	.....	.....
al senhelpaj: ŝirma Brust',	.....	.....
eterneĉ' al ĵura vorto,	.....	.....
eĉ al malamiko: just'.	.....	.....
Virfiero kontraŭ tronoj,	.....	.....
kvankam sangon kostu spit',	.....	.....
al merito estu kronoj,	.....	.....
kaj perejo al insid'!	.....	.....
...	...	...

Ĥoro:

Fermu vin en sankta rondo,  
 Ĵuru do kun glaso-lev',  
 pri l' fidelo al la Dev',  
 je l' Reganto de l' Stel-Mondo!

.....

.....

.....

.....

.....

Ĥoro:

.....

.....

.....

.....

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 - †1805) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 - †1976) en 1958.*

*Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)*

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 - †1805) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

*Arg-133-889 (2008-02-27 19:35:47)*

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 - †1805) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982.*

*Arg-133-264 (2004-01-16 21:22:19)*